



**MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"**

**INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS**

**Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16**

## EL "KIHOTO"

### ĈAPITRO UNUA

*pritraktanta la karakteron kaj okupadon de la fama hidalgo (\*) Don Kihoto de la Manĉo.*

En la vilaĝo de la Manĉo, pri kies nomo mi ne volas rememori, vivis antaŭ nelonge unu el tiuj hidalgoj havanta lancon en armotenilo, malnovan ledŝildon, malgrasan ĉevalaĉon kaj rapidkuran ĉashunton. Foto da legombojaĵo kun iom pli da bovina, ol da ŝafa viando, miksofarĉaĵo preskaŭ ĉiuvespere, (\*\*), "ĉagreno kaj frakasajo" la sabatojn, lentbolaĵo la vendredojn kaj aldona kolombido la dimancojn elspezigis tri kvaronojn da lia rer havo.

La ceteron konsumis pluŝa jako, velura pantaloneto kun samŝtofaj pantofloj por la festoj kaj vesto el plej delikata drapo, per kiu li honoris sin la simplajn tagojn. Ĉe lia hejmo kunvivis domstino preterpasinta la 40 jarojn, nevino lia ne ankoraŭ dudekjara, kaj knabo-servisto por la domo kaj kamparo, kiu samofte seladis ĉevalaĉon, kiel manuzadis branĉotranĉilon. Nia hidalgo ekatingis sian kvindekan jaron: li estis fortikfarta, maldikkorpa, malgrasvizaĝa, tre frumatena kaj ŝatanta la ĉasadon. Oni emas diri, ke lia alnomo estis Kihada aŭ Kesada (ĉar pri tio montriĝas ia diferenco ĉe la priskribantoj), sed laŭ verŝajnaj konjektoj oni

(\*) Oni proponas la novan radikon "hidalgo", ĉar "junkro" signifas "juna nobelo" kaj la vortoj "novelo" aŭ "nobeletto" ne esprimas la ĝustan ideon.

(\*\*) En la hispana originalo: "duelos y quebrantos". Laŭ tiamaj raportoj kiam post malfeliĉa akcidento iu ŝafino mortis, oni dispecigis kaj plekis ĝian viandon por la hejma nutruzado. El la kruraj viandpecetoj kaj eĉ la frakasitaj ostoj oni faris buljonaĵon nomitan "ĉagreno kaj frakasajo", *cagreno* pro tiu, kiun sentis la mastro de la buĉita ŝafino; *frakasajo* pro aludo al la frakasitaj ostoj. Laŭ la opinio de S-ro Rodríguez Marín kaj de la hispanakademia vortaro "duelos y quebrantos" signifas: fritajon el ovoj kaj lardo.—*Rim. de la trad.*

trafas kompreni, ke li estis nomita Kihana. Tio ĉi tamen ne gravas por nia historio; sufiĉas, ke en ĝia rakontado oni ne deflankiĝu eĉ plej malmulte de la vero. Estas, do, sciinde, ke la suprenomita hidalgo, en la tempopezoj de senokupiĝo (kiuj estis plej multaj dum la jaro) sin fordonis al legado de kavaliraj libroj, tiel ŝate kaj plezure, ke li preskaŭ tute forgesis la ĉasan praktikadon kaj eĉ la administradon de sia bienhavo. Lia scivolemo kaj malsagiĝo pri tio tiel malproksimen preteriris, ke li transvendis multe da kulturita bienaĵo por aĉeti legotajn kavalirajn librojn; sekve li portis domen tiom da libroj, kiom li povis kolekti. El ili neniu plaĉis al li tiel multe, kiel tiuj verkitaĵ de Feliciano de Silva, ĉar la klareco de lia prozo kaj lia konfuzega rezonado ŝajnis al li plej ravaj, precipe kiam li legis tiujn flatfrazojn kaj duellalvokojn, en kiuj multloke estis dirate: "*la praveco de la malpravaĵo, kiun oni faras al mia saĝo, tiamaniere malfortigas mian prudenton, ke mi prave plendas pri via beleco*" aŭ kiam li ankaŭ legis: "*la altaj ĉieloĵ, kiu je via dieco vin die fortigas kun la steloĵ kaj igas vin meriti la meriton, kiun meritas via altranga Moŝto*". Per tiaj rezonoj la malfeliĉa kavaliro senprudentiĝadis: li penegadis ilin kompreni kaj eltiri ilian sencon, kiun ne eltirus nek komprenus Aristotelo mem, se nur por tio li estus renaskita. Li ne tre konsentis pri la vundoj, kiujn don Belianis faris kaj ricevis, ĉar li imagis al si, ke eĉ kuracite de plej lertaj kuracistoj tiu kavaliro havus ja la vizaĝon kaj tutan korpon plenaj je cikatroj kaj postsignoj. Malgraŭ ĉio li laŭdis tiun aŭtoron por la maniero fini sian libron per la promeso pri tiu senfina aventuro kaj multajn fojojn trafis lin deziro ekpreni plumon kaj fini ĝin laŭvorte, kiel estas tie promesite. Li sendube estus ĝin farinta, eĉ sukcese, se aliaj pli gravaj kaj senĉesaj pensoj ne estus malhelpintaj. Multfoje li vetdiskutis kun sia samvilaĝa paroĥestro (klera viro licenciato el Sigüenza) pri tio, kiu estis sin montrinta pli bona kavaliro, ĉu Palmerin el Anglujo, ĉu Amadis el Galujo: sed majstro Nikolao, tiea barbiro, diris, ke neniu egalas al la kavaliro de la Suno, kaj se iu povas sin kompari al li, tiu estas don Galaor, frato de Amadis el Galujo,

ĉar li havas taŭgan pretiĝon por ĉio, kaj li ne estas delikatafeka kavaliro, nek tiel plorema kiel lia frato, kiun li ne malsuperas pri braveco. Fine, li tiom enprofundiĝis en legadon, ke li, legante, preterlasis la noktojn seninterrompe kaj la tagojn senintermanke: tiamaniere pro nesufiĉa dormado kaj tromulta legado lia cerbo elsekiĝis kaj li tute perdis la prudenton. Lia fantazio enpleniĝis per ĉio, kion li legadis en la libroj, jen pri ensorĉoj, jen pri batiĝoj, bataloj, dueloj, vundoj, flatdiroj, amoj, ŝtormoj kaj malrealaj sensecaĵoj. Tiel firmiĝis en lia imagado la vereco pri tiu fiktivamaso da fantaziaj trompaĵoj, ke por li ne ekzistis en la mondo alia pli certa historio. Li diradis, ke Cid Rui Diaz estis tre bona kavaliro, sed neniel komparebla kun la kavaliro de la Ardanta Glavo kiu per unu tranĉbato distrafendis en du pecojn du fierajn kaj monstrajn gigantojn. Li pli ŝatis Bernardon el Karpjo, ĉar en Roncesvalo li mortigis la ensorĉitan Rolandon, uzante la artifikon, per kiu Herkuleso premsufokis inter siaj brakoj Anteon, filon de la Tero. Tre favore li paroladis pri giganto Morgante, ĉar, apartenante al tiu giganta generacio, kies anoj estas senescepte fieraj kaj malĝentilaj, nur li estis afabla kaj bonedukita. Sed super ĉiuj li admiradis Rejnaldos de Montalban, precipe kiam li vidis lin elirantan el sia kastelo kaj prirabantan ĉiujn, kiujn li renkontas kaj kiam en Aljende li forŝtelis tiun Mahometan idolon, kiu estis el masiva oro, kiel ĝia historio priraportas. Li estus pagedoninta sian domistinion kaj eĉ plie sian nevinon por regali la perfidulon Galalon per plenvico da piedbatoj.

(Daŭrigota).

El hispana lingvo tradukita,  
VICENTE INGLADA.

## LA KVINPINTA STELO

Tie, malproksime, super la montaro kaj reflektiĝanta en la verda maro sian helan lumon verŝas bela stelo sola, en la granda peco del ĉielo.

Tie, forlasita, stelo ĉiam bela en la grandegeco de la nokto hela pura, tiel kiel virgulino ĉasta estas la plej bela el ĉielo vasta.

Estas la plej granda la kvinpinta stelo kaj aliaj kiuj brilas en ĉielo malpli belaj, lasas sola tiun, kiu superata povas esti de neniŭ.

Tiu bela stelo, kiu sur la maro verŝas sian lumon, montras al homaro la internacian veran unuigon: ĉiuj kunigitaj per la lingva ligo.

Nia standardego, signo de espero, verda kiel maro, flagras sur la tero; sur la verda kampo, la kvinpinta stelo estas la simbolo de la nia celo.

Sub standardo tiu, ĉiuj ravigitaj, iru ni antaŭen brave kaj obstine por efektiviĝi nian celon fine!

M. SANCHO IZQUIERDO.

## REMEMOROJ EL LA AFRICA MILITO

La vizaĝoj de la ekskaptitoj elmontras la grandajn suferojn fizikajn kaj moralajn, kiujn la maŭroj kaŭzis al ili.

Kelkajn monatojn ili restis en mallibereco. Finfine la Patrujo, per mono, atingis la liberecon de la kaptitoj; sed ne de ĉiuj, ĉar multaj mortis pro suferoj.

De post kiam la maŭroj falis amase sur la tutan vilaĝon, viroj kaj virinoj ne sin vidis unuj la aliajn.

Hodiaŭ estas tago de granda feliĉo. Denove geedzoj sin reciproke vidas, gepatroj brakpremas siajn gefilojn, gefianĉoj sin ŝmacas. Ridoj, feliĉecaj larmoj, voĉoj, kisoj, multaj voĉoj... gajeco, multe da gajeco... sed ankaŭ oni vidas malgajajn larmojn, suferantajn virinojn, eblaj vidvinoj; gepatroj sen filoj, filoj kiuj perdis siajn gepatrojn.

Johano trakuras kvazaŭ frenezulo, demandante ĉiujn pri ŝi... "Jes, ŝi estis vidata dum la unuaj semajnoj de mallibereco, sed poste ŝi malaperis kaj neniŭ vidis ŝin plu".

\* \* \*

—Jozefino! Jen via Johano! Rigardu min!!

Sed Jozefino ne ĝojas pro tiu renkontiĝo. Ŝi, anstataŭ rigardi sian amaton, restas tute kvieta, kun plenlarmaj okuloj planken.

—Kio okazas al vi, karulino? Ĉu vi ne estas feliĉa tial, ke ni estas kune denove kaj vivadas ankoraŭ?

—Multajn fojojn mi petis de Dio mian morton por ne suferi tiom da ĉagrenoj, kiujn mi suferis kaj ankoraŭ suferos...

—Ne, ne ĉio ja pasis. Nune ni estos feliĉaj. Ni reiros en nian vilaĝeton en Hispanujo kaj kunedziĝos.

—Ne, Johano—diris Jozefino kape neante kaj senkosole plorante—Vi ne povas jam edziĝi kun mi...

—Kion vi diras?—ekkrias Johano timeme surprizita.

—Ve, al mi malfeliĉulino!!!

\* \* \*

Voĉoj, ridoj, gajeco. La tuta loĝantaro laŭdas la konduton de Johano. "Li estas bonega viro"! Voĉoj, ridoj, muziko, gajeco... Nur Jozefino havas malgajan mienon.

—Ĉu vi ĉiam amos min?—demandas mallaŭte la ĵusedzino, premante la brakon de Johano.

—Ĉiam, etulino mia!—respondas Johano, gaje ridetante.

\* \* \*

Johano estas ĉiam malgaja. Li trairas silente, parolas al neniŭ, ĉiam kun mallevita kapo... Li suferadas.

\* \* \*

La dato antaŭfiksita de Naturo alvenas.

Jozefino en lito rezignacie suferadas la dolorojn kaj malgaje rigardas sian edzon. Johano promenas ekscitita en la ĉambro, rigardante planken kun terura mieno.

—Johano!—ekĝemas la malsantulino.

—Kion?—li respondas surprizite, eltirante sin el siaj pensoj.

—Ĉu vi avizis onklinon Ramonan?



—Jes, mi jam avizis ŝin—li respondas funebre, ne rigardante sian edzinon kaj daŭrigante sian promenadon.

“Onklino” Ramona estas maljunulino, kiu en la vilaĝo ĉiam helpas la alvenon de novaj idoj en la mondon... Johano ne avizis ŝin. Li deziras esti tute sola... kaj nur tiam, kiam Johano pensas, ke li estos sola tiumomente, liaj okuloj montras vengplenan gajecon...

\* \* \*

Fine ĝi alvenis. Johano prenas la malgrandan korpeton per siaj manegoj kaj ridas... liaj okuloj eliras el la orbitoj.

—Jam mi havas cin, malbeninda!! Mallonga estos cia vivo!!! La infaneto ekploras. Jozefino rigardas sian edzon kaj terurigas pro lia vizaĝo.

—Johano!!!—ŝi ekkrias kaj svenas.

Tiu ekkrio revenigis Johanon en normalan staton, kaj li falis surgenue kontraŭ la lito, plorante.

—Pardonu min, *Patrino!!* Pardonon, mia Dio!! Mi, momente, forgesis ke ni estas gefratoj!! Pardonu min!!

JOSE OROS.

(El la “rondeto “La Kvaro”).

## LA VERBO

In principio erat verbum!!!...

Se ĉiuj, eĉ la plej partiaj verkistoj, konfesas la mirindan ĝeneralan simplecon de Esperanto, precipe ekt. ĉi tiu ĉi genia simpleco en la konjugacio de verboj. Tia rimarko estas sendube en la plej alta grado valora kaj ŝatinda, kiam oni memoras, ke la verbo devige estas la plej uzata, la plej esenca vorto en kia ajn, natura aŭ artefarita, lingvo, kiam oni poste pensas, ke tiu ĉi ĉefa vorto estas ankaŭ la plej malfacile uzebla en niaj eŭropaj lingvoj, kaj aparte en la franca. Jes, kaj tion mia estimata legantaro same scias kiel mi la francaj konjugacio plenega estas je kaptiloj danĝeraj kaj multnombraj. Ĉu vi volas, ke mi diru kion da diversaj finiĝoj ĝi enhavas? Nur *dumil-ducent-sesdek-kvin!!* (tiu ĉi kalkulilo estas farita de hispano).

La teruraj malfacilaĵoj de nia konjugacio, kiuj malesperigas la fremdulojn rememorigas min pri amuza rakonteto, kiun mi legis antaŭ nelonge mi ne scias plu en kiu libro. En kupeo de vagonaro, sur la norda fervoja linio, malgrasa Anglo, kun flavruĝaj vangharoj, sin fervore kaj laŭte ekzercadis konjugacii la francan verbon *aller* (iri) unu eble el la plej malregulaj en niaj naciaj lingvoj. Li do ŝvitante klopodis balbuti la indikativon de la estanteo: *je vais, tu vas, il va, nous allons, vous allez, ils vont* (mi, ci... ili iras).

—“Vi eraras, kara Sinjoro,—tiam ridetante diris al li malica pariza komercvojaĝisto, kiu sidis apude en la sama vagono,—la vera kaj sola indikativo de la estanteo estas la sekventa: *je vais* (mi iras), *tu danses* (ci dancas), *il se promène* (li promenas), *nous courons* (ni kuras), *vous partez* (vi foriras), *ils marchent* (ili marŝas).

Senkuraĝigite la malfeliĉa Anglo preferis de nun trankvile kaj senĝene ekdormi en sia angulo pli, ol vane ekbatali kontraŭ la francaj konjugacioj kaj li nur malĝoje murmuris palpebrumante “*Quelle irrégularité!*” (Kia malreguleco!).

Ĉu laŭ via opinio la pariza vojaĝisto tro severa kaj maljusta estis pri la franca gramatiko? Tute ne.

La supredirita ekzemplo plej amuze pruvas, ke Esperanto superas per sia simpleco la francan lingvon, ĉar ĝi nur uzas dekdu finiĝojn por la konjugacio de siaj verboj: — i,—as,—os,—us,—u,—anta,—inta,—onta,—ata,—ita,—ota. Rimarku cetero kiel facile memoreblaj kaj elerneblaj estas tiuj ĉi 12 finiĝoj, ĉar la vokalo *a* ĉiam karakterizas la estantecon, *i* la estintecon kaj, *o* la estontecon. Se vi fine konstatas, ke multaj el la simplaj aŭ malsimplaj tempoj, kiujn oni tiel ricevas, eĉ ne ekzistas en la grandaj eŭropaj lingvoj vi estos devigita konfesi, ke la esperanta konjugacio ne nur estas la plej simpla, sed ankaŭ la plej fleksebla kaj la plej riĉa.

Franca Generalo Faidherbe iam prave diris: “Kio plej multe kontraŭstaras al la franca koloniigado? La verbo!! Kaj malfeliĉe tiu ĉi malgajiga konstato sin jetas al la okuloj de ĉiuj francoj. Sed ĉar la samaj malfacilaĵoj ne kontraŭstaras al la rapida disvastiĝado de nia kara internacia lingvo ni ne dubas ke la tutmondo fariĝos baldaŭ *Vastega kaj floranta kolonio esperantista!*

Originale verkis.

GUSTAVE PHILIPPET.

*Rim. de la Red.*—Tiu ĉi amuza rakonteto estis verkita de la franca Esperantisto la 12an de januaro de 1903. Multe pluvis jam de post tiam kaj la varma deziro de nia samideano, povus nun esprimiĝi, same kiel tiam. Kiel malrapide la homaro plenakiras siajn plej gravajn eltrovojn!

## Disdonado de Esperantaj libroj

Ni ĉiuj scias ke la esperantaj libroj estas tre multekostaj. Preskaŭ ĉiuj esperantistoj ne havas sufiĉajn ekonomiajn rimedojn por aĉeti ilin. Frateco, ĉiam dezirante, ke siaj anoj povu atingi la librojn por perfektigi en nia lingvo, aĉetis la plej gravajn el ili, kiujn por malgranda luprezco ĉiuj fratecinoj povas legi; sed tio ĉi ne estas sufiĉe; ĉiu el ni dezirus posedi malgrandan bibliotekon propran kaj tio ĉi estas nun la celo de Frateco; por tio ĝi organizas disdonadon de libroj la plej gravaj esperante presitaj havi rajton al tiu ĉi disdonado oni kreis *laŭ ilian umerajn*, kiujn oni povos akiri per la malgranda kvanto de 0'25 ptj.

La disdonotaj premioj estos jenaj: 1.<sup>a</sup> Origina la Verkaro; 2.<sup>a</sup> La Faraono (3.v); 3.<sup>a</sup> Kompleta Gramatiko; 4.<sup>a</sup> La Praktiko (1 jaro); 5.<sup>a</sup> Fundamenta Krestomatio; 6.<sup>a</sup> La Amo en la jaro 10.000; 7.<sup>a</sup> Lingvo, stilo, formo; 8.<sup>a</sup> Vivo de Zamenhof; 9.<sup>a</sup> “Esperantlingva Novelbiblioteko” (6. v) 1/6 10.<sup>a</sup> Ilustrita Biblioteko (1.<sup>a</sup> s.); 11.<sup>a</sup> Ilustrita Biblioteko (2. s.); 12.<sup>a</sup> k. 13.<sup>a</sup> La Kreitaj Profitoj; 14.<sup>a</sup> Kompleta Esperantaj Rimvortoj; 15.<sup>a</sup> A. Dürer; 16.<sup>a</sup> Lingvaj Respondoj.

La disdonadon oni faros tiel baldaŭ, kiel estos disvenditaj ĉiuj numeroj sed ne antaŭ la 15.<sup>a</sup> Aprilo; oni avizos kiam okazos tio ĉi; de tiu ĉi ago oni redaktos akton.

Tiu ĉi unua disdonado estas kiel provo kaj ĝia rezultato diros al ni ĉu ni povos pligrandigi la numerojn kaj nombron da disdonotaj libroj.

## ANEKDOTOJ

Vaugelas laboradis dum tridek jaroj, kiel Chapelain, ne super epopeo, sed super traduko el Quinte-Curce, kiun li aliformigadis kaj korektadis senĉese kaj kiun li havis la kuraĝegan konstantecon refari tute, kiam la tradukoj de d' Ablancourt, dume aperintaj, instruis lin pri difektoj de lia propra traduko. Kiam Chapelain kaj Conrart reviziis tiun verkon, por ĝin publikigi, ili trovis ĉiun frazaron margene tradukitan laŭ 5 aŭ 6 malsamaj manieroj, preskaŭ ĉiuj tiel bone faritaj, ke ili tre embarasiĝis dum elekto. Ili uzis tri aliajn longajn jarojn por fari la elekton kaj tio farita, Patru sukcesis eltrovi alian tradukon, ankoraŭ malsaman, laŭ kiu li faris specialan eldonon, Kiom da diversaj tradukoj estis Vaugelas' provinta? La spirito konfuziĝas pri tio: Tiel li meritis, ke Balzac, sankciinto de tiom multaj aŭtorfamoj, skribis per sia belega stilo, "La Aleksandro de Filipino estas nevenkebla, kaj tiu de Vaugelas estas neimitebla.

(V. Fournel, Historio pri la 40 apogseĝegoj).

\*\*\*

En Neapolo, iu Malta komandoro, viro riĉa kaj avara, devigis siajn servistojn tiom longe portadi la saman livreon, ke iu ŝuflikisto el najbaraĵo, vidante la truoplenajn vestojn de lia servistaro, mokis pri ili. Ili plendis pri tio al sia mastro, kiu venigis la ŝuflikiston kaj akre riproĉis lin pro lia insultemo. Mi, sinjoro? Tio estas kalumnio. Mi tro scias la respekton, kiun mi devas prezenti al via ekscelenca Moŝto, por ne moki pri via livreo! —Oni tamen diras, ke vi senĉese ridas vidante la vestojn de mia servistaro.—Ĝi estas vero, Sinjoro, sed mi ridas je la truoj kaj en la truoj ne estas livreo".

(Literatura kalendaro, 1789).

\*\*\*

Bukins Marlborough insistpetadis lian malsanantan edzon ke li trinku ian ordonitan kuracilon. La generalo malcedetis, grimacadis, montrante la malplezuron, kiun kaŭzos al li la engluton de la trinkaĵo.

Lia edzino en la celo kuraĝigi lin denove petis. "Eltrinku, karulo, mi estas certa, ke ĝi tre multe taŭgos por via resanigo; se ne, ke oni min pendigu".

"... Kuraĝu, ĝenenda laŭ ĝiaj malvarme kuracilo Cart, uĝlutu tuj, ĉar kio ajn okazos, vi min gajnos".

\*\*\*

Oni certigas, ke Saint-Simon faris iam al S-rino Staël tiun ĉi strangan proponon:

"Vi estas, Sinjorino, la plej eminenta virino de via epoko, mi estas ĝia plej granda filozofo; mi kunedziĝu por vidi, kio estos infano naskiĝanta el tia kuniĝo".

(G. Bourdin, Saint-Simon).

\*\*\*

Imperiestro Aŭgusto en sia mortlito diris adiaŭ per jenaj vortoj: "Ĉu mi bone prezentadis la vivan komedion? Se jes, aplaŭdu".

\*\*\*

Oni diris pri Parizo, ke ĝi estas infero por ĉevaloj, purigejo por viroj kaj paradizo por virinoj.

## GRAVA

«Esperanto kaj Paco» avertas al ĉiuj mendintoj de esperantaj glumarkoj kontraŭmilito, ke ankoraŭ ili ne estas pretaj pro la malseriozeco de la presisto S-ro Castro. Ni petegas al ĉiuj mendintoj pardonu nin; ni ne estas kulpaj. Tuj kiam ili estos presotaj ni dis sendos ilin.

## SCIIGOJ

Ni ricevis broŝuron "La fabelo pri la granda turo" k. t. p. de Sr-o H. Fischer.

Varme ni rekomendas al ĉiuj samideanoj aĉeti kaj legi tiun interesplenan verketon, kiu konsistas el 6 plene konvinkigaj kaj belaj rakontetoj. Ĝi estas bonega propagandilo vere meritanta grandan disvastigon.

Kore ni dankas la sendinton.

## SPRITAJOT

—Mi havas hejme mirindan pentraĵon.

—Kion ĝi reprezentas?

—Vinberaron tiel mirindan, ke la birdoj haltas por piki la vinberojn.

—Mi havas pentraĵon pli rimarkindan. Sur ĝi estas pentrita hundo tiel vere, ke la aŭtomatuloj devigis min meti al ĝi buŝumon.

\*\*\*

—Du komercistoj disputis pri la graveco de iliaj komercoj.

—La unua diras:

—Imagu ke mia firmo elspezas ĉiujare nur por inko 8.000 ptjn.

—Tio estas nenio—respondis la alia—Mia firmo ŝparas 10.000 ptjn nur ne metante la punktojn super la litero i.

\*\*\*

—Ĉu la procesigato estas edzigitaj?

—Jes, sinjoro.

—Kun idaro?

—Ne, kun Marinjo.

—Idaro volas diri kun filo.

—Tiam, jes; mi havas "idaron" kaj "idarimon".

\*\*\*

—Ĉu vi estas certa, ke via voĉo plenigos tiun ĉi ampleksan salonon?—demandis la amiko.

—Mi nur esperas—malgaje rediris la kantonto—ke ĝi ne malplenigos ĝin.

\*\*\*

Bofilo diras al sia bopatrino:

—Via filino estas estaĵo tre netolerebla. Ŝi suferas pro la nervoj; ŝi estas koketulino, postulema, tromemama...

—Ĉu vi kredas—respondas la bopatrino—ke se ŝi ne havus tiom da malbonaĵoj, mi ŝin estus doninta al iu malsaĝa kiel vi?